Er macht nicht Halt vor dem **Fremdwort**, das für den Fachphilologen an der Grenze seines Bereiches steht, in der wissenschaftlichen Sprache aber sich als Träger einer unübersetzbaren, schärfer umrissenen Bedeutungsschattierung in das anderssprachige Gebiet einbürgert und dort oft eine andere funktionelle Stelle einnimmt als die Eingeborenen, und noch zu wenig erforscht ist. Die **Philologie** auf ihrem historisch und literarisch zwar weitem, naturgemäß aber national beschränktem Gebiet, und die international vergleichende **Linguistik** mit psychologischen Einzelfragen und, nach Zusammenhang und gemeinsamen Ursprung der Sprache suchend, mit der fernsten Vergangenheit beschäftigt, ignorieren allzusehr die Sprache der internationalen, modernen Wissenschaft. Sie sind analytisch eingestellt und haben wenig Interesse für Sprachsynthese. Diese letztere gehört zwar im Besonderen den Plansprachen zu, bildet jedoch eben auch einen Teil der Normung, also zielbewußter vereinheitlichender Beeinflußung der wissenschaftlichen Zwecksprache überhaupt. Wüster, Elektrotechniker vom Fach und bedeutendster Esperantologe, als solcher durch seine sonstigen Werke, voran das Enzyklopädische Wörterbuch bekannt, kann sich in seiner ganzen Einstellung zum Problem und seiner Arbeitsmethode mit Recht gerade auf vorliegendem Gebiet als besonders berufen betrachten. Sein **Vorstoß als Techniker** in das sprachliche Gebiet ist bei der bisherigen Haltung der Sprachwissenschaft diesem Sondergebiet gegenüber, nur zu begreiflich. Er stellt sozusagen der Technik als angewandten Physik die bewußte Sprachregelnng als „angewandte Sprachwissenschaft" gegenüber. Er schlägt mit seinem Werke die Brücke zwischen dem Terrain des sprachlich geschulten und interessierten Technikers einerseits und dem noch jungen Boden des ernst forschenden und für praktische Zwecke werbenden Plansprachlers andererseis, über welchen Bogen die Sprachgelehrten gehen sollen.

Ueberall zeigt sich Wüsters **Gründlichkeit**. Er dringt unbarmherzig bis zur letzten Konsequenz vor und füllt an mehreren Stellen fühlbare Lücken aus, am meisten in der Semologie (Bedeutungslehre) der Wortgruppen und Zusammensetzungen — die Präpositionalgruppen bilden von jeher eines seiner Lieblingsthemen. Was aber schon vorhanden war, wird gewissenhaft verwendet und zitiert. Auffallend viele **Quellenangaben** mit genauesten Verweisungen begleiten den Text fast auf jeder Seite — es werden gegen 1000 verschiedene Namen von Autoren, Körperschaften und Stellen von Zeitungsartikeln aufgeführt — und erhöhen so noch wesentlich den Genauigkeitswert der Arbeit. Die Vielzahl der benützten Quellen ist, wie gesagt, auffallend; denn der behandelte Gegenstand gehört ja nicht zu den alltäglichen Themen der Wissenschaft. Sie wird nur erklärlich, wenn man um die große private Spezialbibliothek weiß und dessen nie ruhenden Bienenfleiß kennt. Zahlreiche **statistische Hinweise**, größere und kleinere in Zahlen und Symbolen gebotene Ueberblicke, leicht verständliche, mitunter recht originelle **Diagramme**, die das Auge auch des flüchtigen Lesers sofort gefangen halten, treffende, wohlüberlegte **Beispiele** vervollständigen den Text und eröffnen überraschende Perspektiven. So werden z. B. die internationalen Körperschaften, ihre Tagungen und Kongreßsprachen auf einer großen Tabelle übersichtlich vorgeführt; die Begriffsübertragung für Namen von Maschinenteilen zeigt ein äußerst anschauliches Liniendiagramm, wie solche in dieser Art für sprachliche Phänomene noch selten in der Literatur angewendet werden. Eine vergleichende Analyse der Begriffsformen von Wortgruppen und -Zusammensetzungen in den Hauptsprachen wird in tabellarischen Uebersichten, welche Anzahl und Art der jeweils vorkommenden Elementarbindungen angeben, dem Verständnis näher gebracht. Es werden die sprachlichen Untersuchungen übrigens stets an Hand von Wortbeispielen aus sechs Sprachen dargelegt, vergleichsweise werden auch noch andere Sprachen herangezogen.

(Schluß folgt.)

D-ro A. Bischitzky 60-jara.

La membro de nia Intern. Kuratora Komitato d-ro A. Bischitzky, prezidanto de „Verda Stelo" en Prag, festas la 16. de nov. sian 60. naskiĝtagon.

Ni ege ĝojas, ke ĉi tiu malnova pioniro de nia movado, konata tutmonde pro sia traduko de Maria Magdalena, verko de lernlibro kaj kunlaboro en Int. Medicina Revuo, en bona sanstato kaj juneca freŝeco senlace laboras por nia Esp.

Elkore ni gratulas lin kaj la grupon de Prag.

IEMW: Steiner.

Patrineto Anna Tuschinski 90-jara.

La 4. dec. festos la Danzig-anoj la 90-an naskiĝtagon de patrineto Tuschinski, fondintino de la Danzig-a E.-grupo.

Ni elkore kunfestas ĉi tiun tagon dezirante, ke patrineto Tuschinski ankoraŭ longe en saneco restu nia membro de Int. Kuratora Komitato.

Elkoran gratulon.

IEMW: Steiner.

Prof. d-ro Wladimir Köppen.

La mondfama meteorologo, festas hodiaŭ sian 85-an naskiĝtagon en Graz. Dum la longega tempo de 60 jaroj li estis fervora esploranto de meteorologiaj, klimatologiaj, paleoklimatologiaj kaj aerologiaj problemoj. La progreso de meteorologio multe ŝuldas al liaj vastaj verkoj, aperintaj en gazetoj kaj bultenoj, aŭ publikigitaj kiel libroj. Nun la japana meteorologia societo publikigas japanlingve la skizon de la vivo de prof. Köppen en la septembra numero de tiu ĉi gazeto por esprimi niajn estimojn por liaj grandaj meritoj, kaj niajn korajn bondezirojn por lia naskiĝtago.

Ni esperas, ke li havu multajn venontajn jarojn feliĉajn kaj liaj ampleksaj scioj daŭre ludu gravan rolon en la progreso de meteorologio.

la 25. de sept. 1931.

Aerologia Observatorio en Tateno, direkt. W. Oishi, eldoins apartan broŝuron kun la supra teksto kaj la originala en japana lingvo kun la bildo de nia eminenta samideanoj.

Ni elkore gratulas al nia fidela membro de Intern. Kuratora Komitato kaj deziras al li multajn feliĉajn jarojn inter ni.

IEMW, Steiner.

Geedziĝis
Gustav Weber,
nia diligenta 2. sekretario, kaj
Maria Dittrich.
Nian elkoran gratulon!

Intern. Esp.-Muzeo en Wien.

Esp.-Societo por Stirio.

Antaŭ 25 jaroj estis fondata ĉi tiu organizo, kiu ludis ĉiam gravan rolon en nia aŭstria movado. Aro da senlacaj s-anoj laboris por nia afero en Graz, tereno ne tro favora al E. Sed ili ne cedis, ili daŭrigis sian laboron kaj kunhelpos al fina venko.

S-ro Bartel dum la tuta tempo estas estrarano! Ĉu ankaŭ aliaj?

Ni elkore gratulas kaj dankas ilin!

Esp.-Societo „Danubio".

La 11. de nov. 1911 estis fondata „Danubio". Nun jariĝis la dudekan fojon la fondiĝtago, je kiu ni elkore gratulas. Celkonscie la grupo laboris dum la tuta tempo kaj daŭrigos siajn penadojn je disvastigo de E.

Du s-anoj dir. Kaftan kaj s-ro Popper apartenas depost fondiĝo al la societo.

Ni deziras daŭrigon de la penadoj sub la senlaca longjara prez. R. Ĉech.

Viktor Hawlik,

ministeria konsilisto en Ministerio por Komerco kaj Trafiko en Wien, mortis la 17. oktobro 1931.

Terura kormalsano post kelkmonata malsaneco lin forrabis de ni.

Naskita 28. julio 1876 en Eberau, Burgenland, kiel filo de oficiro, li dejoris ĉe poŝtdirekcioj en preskaŭ la tuta iama monarkio kaj venis post la renversiĝo en la ministerion al Wien.

Li estis bonkora, ĉiam helppreta homo, kiun ĉiuj konatoj ŝategis kaj priploras ĉi tiun gravan perdon. Ankaŭ ni perdis en li nian afablan, helppretan vicprezidanton, kiu ĉiam propagandis por Esperanto en sia multnombra konatularo.

Ni lin ĉiam honore memoros!

IEMW: Steiner.

Kondolencon al Max Butin, LK, okaze de la morto de lia patro August Butin, eksdirektoro de l' elektoprinca banejo en Bad Godesberg.

Pripensu!

Aŭstria Esperantisto devas ĉesi sian aperon en sia 9. vivjaro, se vi ne klopodos varbi almenaŭ

100 abonantojn!

En la intereso de la E.-movado en nia lando helpu!

Premio: Por ĉiu varbita abonanto vi ricevos **senpage** po 1 **Esperanto-Sprechübungen** nach Bildern von Hölzel, kompilita de Fritz Stengel, 103 paĝoj, kun 9 bildtabuloj, aŭ
Wien, ilustr. gvidlibro. 64 paĝa, komp. de Steiner.

Esp. en Papua.

D-ro Fred. J. Williams eksprez. de Sydney-E.-grupo, nun dejoras kiel registara kuracisto en Samarai. La ŝalupo, kiun disponigis al li la registaro, portas la nomon „L'Espero".

En Gedulalara laboras pastro de anglikana misio, pastro A. H. Lambton, kiu tradukis kelkajn rakontojn el la papua lingvo en Esp. (Laŭ „La Sua Kruco")

Ĥinaj perloj.

Libere tradukita de S. Sindoo.

Sidas solaj.

Flugis birdoj for,
Eĉ nubeto for
Sidas solaj ni
Kune, l' mont' kaj mi.

En Spegulo.

Ha, espero, kvazaŭsonĝ' junula!
Sort' grizigas kapon senprosperan.
Vidas mi en la profund' spegula,
Eĉ la bild' kompatas min mizeran.

(El „La revuo orienta"-Tokio.)

Ŝercangulo.

Juna viro kaj virino, kiuj sidis malantaŭ mi en teatro, flustris senĉese. Ili enuis min. Mi min turnis al la juna viro kaj diris: „Pardonu, mi ne povas aŭdi eĉ unu vorton." — La juna viro respondis: „Ne estas viaj aferoj, kiujn mi rakontas al mia edzino."

(Laŭ „Esperanto-Lando")

Gravaĵoj.

Radio-kurso el Genève. Radio-Genève komencis la 29. X. E.-kurson por komencantoj ĉiuĵaŭde 19 h 20. Gvidanto Univ. prof. Bouvier.

Eldona Soc. Esperanto, Stockholm eldonis novan serion de 6 belaj fotografaj poŝtkartoj el Stockholm kun sveda kaj E.-tekstoj. Prezo po 0.15 sved. kr.

Praha. Kiu deziras viziti Ĉeĥoslovakujon aŭ bezonas iajn informojn, sin turnu al Neŭtrala Centro de Esperanto en Praha, adreso Robert Bloch, Praha-Smichov 1364, kaj li ricevos tujan senpagan informon. Nepre aldonu respondkuponon!

„La Juna Amerikana Esperantisto", Fort Lee, N. J., USA, dissendis specimenan numeron en julio nj.

Eld. Fr. Ellersiek, Berlin SW 61. Wilmsstraße 5, eldonis sian 21. Esperanto-katalogon, 36 pĝ., senpage haveblan.

„Maison de Champagne", Eperney, Francujo kreis por la samideanoj apartan markon de ĉampano, kiun ĝi nomas „Notre Champagne". Sur la etiketo de la botelo estas la verda stelo kun la surskribo „Verda Stelo". Krome la firmo varbas pere de E.-propagandiloj.

Haida. La vojaĝoficejo de Ŝparkaso de urbo Haida, centro de la vitroindustrio en Nordbohemujo, kaj pro tio multvizitata de eksterlandanoj, akceptas por sia konstanta ekspozicio Esp.-prospektojn ktp. Tiun sukceson atingis la prez. de E.-grupo „Ĉiam antaŭen", Franz Böhm, Haida, Talstr., CSR, ĉe la fakestro de ŝparkaso, s-ro Huder. Sendu novajn E.-prospektojn ktp. al prez. Böhm.

Hungaria Esperantista Societo Laborista kaj la **eldonejo** de ĝia oficiala organo, „**Antaŭen**" transloĝiĝis al Budapest VII. Dob-utca 90.

Aŭstria Esperanto-Asocio

Linz, Weissenwolfstr. 31

Graz. S-anoj vizitu la paroladon de Scherer en Urania.

Innsbruck: Kurso komenciĝis la 20. okt. kun 13 p. Ejon disponigis Komerca Akademio. Gvid. R. Kühbacher.

Klagenfurt: En elektrofarejo kurso kun 17 anoj (gvid Weghofer)

Klagenfurt S-anoj partoprenu la paroladon de Scherer en Urania la 5. dec. Instigu ankaŭ la E.-lernantojn.

Lienz: Depost fondiĝo de Komerca Lernejo en 1928 ĉiujare estas instruata Esperanto, ankaŭ ĉijare. Gvidanto F. Aeg Jos. Kirchner. — Grupfondiĝo ne estis ebla, ĉar la lernantoj post finigo de la studoj forflugas en ĉiujn partojn de nia lando, sed ili kunportas la ĝermojn por Esperanto . . . . Krome estas nur s-ano tie LGR. d-ro Markoller. Hotelo Post estas kunvenejo por la esp.-istoj venantaj en ĉi tiun belan lokon de Tirol.

Linz: Avizo. Ĉiuj geesperantistoj, ĉu anoj de nia societo aŭ ne, estas kore invitataj partopreni la Scherer-vesperon la 25. nov. je la 18 h en salono de gastejo Puchner, Scharitzerstr.

Ried i. I.: Ein Aufsatz: „Gibt es eine Lösung des Weltsprachenproblems?" Von Fachlehrer Jungschaffer ist erschienen in „Rieder Volkszeitung", „Reichspost" (gekürzt), „Steyrer Zeitung" und „Oberösterr Morgenblatt". In der Redaktion der bekannten Zeitschrift „Schöne Zukunft" blieb das Manuskript, dem für den Fall der Nichtannahme das Rückporto beigeschlossen war, sechs Wochen liegen, eine diesbezügliche höfliche Anfrage (Doppelpostkarte) wudre gar nicht beantwortet. Auf Wunsch wurde dann der Aufsatz, natürlich unveröffentlicht, zurückgeschickt. Nun, Esperanto ist ohne das Wohlwollen der „Schönen Zukunft" groß geworden und wird sich auch gegen ihren Willen durchsetzen. — Einen anderen, ebenso

langen Aufsatz „Esperanto, die Welthilfssprache“ von H. Jungschaffer brachten: „Rieder Volkszeitung“ und „Innviertler Zeitung“. Erstere, das verbreitetste Wochenblatt Oberösterreichs, bringt von Zeit zu Zeit einen aktuellen Rundblick aus „Katolika Vivo“, übersetzt von Dr. Ad. Halbedl, Rechtsanwalt in Ried, unter Hinweis auf die genannte Esperantozeitung. — Im kath. Gesellenverein hat am 20. Oktober Dr. Halbedl einen Kurs (Ĉe-Methode) begonnen, zu dem sich 30 Teilnehmer gemeldet haben.

Mattighofen: Forloĝiĝis instr. Ehrengschwandtner. Intereso por kurso, mankas la instruanto.

Salzburg: Vendrede, la 4. dec., speciala kunveno en ĉeesto de s-ano Scherer.

Wels: Klopodoj aranĝi kurson. Varbleteroj dissenditaj.

Wien: E.-soc. Danubio: Kunveno ĝis trovo de taŭga ejo ĉiun lundon en Kaffee Eckerr, VII. Lerchenfelderstr. 23.

Wien: Merkreda Klubo: Akademiaj kursoj, gvidataj de d-ro Pfeffer kaj E. Werner, 19 h 30 Schäfferg. 4; **Vendreda klubo:** kunvenoj kun bela programo en Kaffee Kolowratring, I. Schubertring 2, 19 h 15; **Sabata klubo:** Tiuj s-anoj, al kiuj sabato estas plej taŭga por kunveni, tion sciigu al prez. Hovorka, tel. A 16158. Je sufiĉa anonco estos aranĝataj kunvenoj kun valora programo.

Wien: Volkszeitung ĉiusemajne publikigas tutkolonan informon pri E.

Wien: Kat. Unio Esp.: La 18. nov., 16 h 30 estrarkunveno (Schottenkanzlei).

Wien: S-ano **G. Weber** komencis Esp.-kurson.

ESPERANTO-SOCIETO POR STIRIO

Graz, VI., Schönaugasse 6.

(17) OG Graz. 13. ord. Hauptversammlung 6. XI. 1931. — Vorsitz: Obmann Reg.-Rat Storm; Gäste: Reg.-Rat Steiner (Wien), Ehrenvorsitzender des Oe. E. B. und H. Dürschmied, Del. UEA und Vors. des Esp.-Vereines E. Peltier, Graz. Vom Ehrenmitglied des Vereines H. Ob.-Stabs-Arzt Dr. W. E. Dietl (Baden bei Wien) ist ein Begrüßungsschreiben eingelangt.

Auszug aus dem Tätigkeitsbericht: Unsere Bestrebungen, die Berufslehrerschaft aus ihrer gewollten Unkenntnis der Esperanto-Sache zu einer unvoreingenommenen Prüfung zu veranlassen, hatten leider noch keinen Erfolg; die wiederholten amtlichen Veranstaltungen des Stadtschulrates von Graz fanden bei der Lehrerschaft kein Interesse. Die Esperantokurse für Hauptschüler werden von den Herren Reg.-Rat. Storm und Gym. Prof. Hainschegg geleitet. In der Zeit vom 9. I. bis 29. V. wurden 17 Uebungsabende mit Vorträgen über Stilistik (5), Geschichte des Esperanto (3), Organisation (2), Grammatik (6) und Volkskunde (1) abgehalten; als Vortragende stellten sich 8 Vereinsmitglieder und 2 Gäste zur Verfügung; einige dieser Uebungsabende waren von über 100 Personen besucht. Die Grazer „Tagespost“ hat jeden Freitag die Zusammenkünfte und Veranstaltungen der Gruppe unentgeltlich angekündigt. Das Grazer Messeamt stellte ein Schaufenster seines Stadtbüros für eine ständige Esperanto-Ausstellung zur Verfügung. Der Mitgliederstand der Gruppe ist auf 96 gestiegen.

Auszug aus der Verhandlungsschrift: Die vom Obmann und vom Vertreter des Schriftführers erstatteten Tätigkeitsberichte werden mit Beifall zur Kenntnis genommen. Die Berichte des Zahlmeisters und der Rechnungsprüfer werden genehmigt. In die neue OG-Leitung werden die Herren Bartel, Bauer, Dr. Biehler, Lossos und Rogler gewählt. Herr Reg.-Rat Storm hat eine Wiederwahl leider abgelehnt, die dringenden Bitten der Versammelten vermochten ihn nicht von diesem Entschluß abzubringen. — Als Vertreter der Gruppe bei der Hauptversammlung des Vereines werden die Herren Perneg, Turk und Wallner und Frl. Storm. — Den von der Vereinsleitung an die Hauptversammlung zu stellenden Anträgen, betreffend Abgaben und Vereinsorgan, wird zngestimmt. — Die Jahresbeiträge bleiben gleich wie im Vorjahre, nämlich: für ord. Mitglieder 8 S einschließlich Bundesabgabe und Bezug des AE für 1932, für unterst. Mitgl. 5 S, für Familienmitgl. 1 S; Einschreibgebühr 1 S; die Gruppenleitung wird ermächtigt, in Ausnahmsfällen die Beiträge zu ermäßigen oder gänzlich nachzulassen. - Die Lesegebühr für die Bibliothek wird mit 10 g pro Werk und Monat festgesetzt.

Berichte und Anträge: H. Schulrat Schöpfer (Voitsberg) berichtet, daß er einen Esperantokurs für Hauptschülerinnen mit 18 Teiln. begonnen hat; zur Anschaffung von Lehrbüchern für unbemittelte Schülerinnen widmet die Gruppe 10 S. — H. Reg.-Rat Storm berichtet über den am 1. XII. in Graz stattfindenden Urania-Vortrag von Josef Scherer; siehe besondere Mitteilung! — H. Reg.-Rat Steiner (Wien) berichtet ausführlich über die Neuerwerbungen des Intern. Esp.-Muzeo in Wien; die OG schließt sich dem Museumsverein als Mitglied an.

(18) Vortrag Scherer. — Die Grazer Urania hat Herrn J. Scherer (Los Angeles), der im Auftrage des Esp.-Weltbundes jetzt in Europa Vorträge hält, zu einem Lichtbildervortrag über „Hollywood, das Filmparadies“

gewonnen. Der Vortrag findet Dienstag, den 1. Dezember um halb 8 Uhr abends im Festsaal der Handelsakademie (Grazbachg.) statt. Er wird in deutscher Sprache gehalten und dient mittelbar der Esperantowerbung. Wir bitten unsere Mitglieder, sich rechtzeitig mit Karten zu versorgen und Bekannte zum Vortrag mitzubringen. Unseren Mitgliedern wurden von der Urania dieselben Ermäßigungen eingeräumt die ihre Mitglieder genießen. Eintrittskarten werden für Urania-Mitglieder in der Buchhandlung Cieslar, Hamerlinggasse, für unsere Mitglieder und Freunde an den Gruppenabenden und bei H. Bartel, Schönaugasse 6/II, abgegeben. Preise der Plätze: (ermäßigt): 1.—10. Reihe S 1.25, 11.—16. S 1.—, 17.—23. 75 g.

(19) **OG Graz. Mitgliedsbeiträge.** — Bis 6. XI. sind die Beiträge von folgenden Mitgliedern eingelangt: für 1930/31 (3. Liste): Adam, Böhm, Hallamayer R., Jantscher (Rest) Mag. Klotzmann u. G., Schmeißer, Fuchs, Fees, Hallamayer M., Hainschegg, Laschatt (Rest); für 1931/32 (1. Liste): Dr. Dietl, Dr. Biehler, Dr. Kaspar, Kirchner, Prof. Dr Köppen u. G., Maly (Teil), Schönemann, Schöpfer, Tumpach, Sartori.

Bartel.

Rimarkindaj presaĵoj

Tagblatt-Bibliothek, Wien.

Wörterbuch Esperanto-Deutsch von Dr. Emil Pfeffer eldoniĝis ĵus en sia 4. eld. (16.-18. milo) kaj enhavas ankaŭ la aldonojn (Kvara oficiala aldono de la Esperantista Akademio al „Universala Vortaro“ kaj Neoficialaj vortoj el la scienca kaj teknika fakoj). La granda vendita kvanto jam sufiĉe montras la ŝatatecon de ĉi tiu vortaro. St.

Heroldo de Esperanto, Köln.

La vojo returne de Erich Maria Remarque. 370 p., 1931, prezo Rm 6.—; bind. 8.50.

La unua volumo de Remarque eble volis pruvi, ke ekzistas homoj kiuj ne taŭgas por io alia. Ekzistas ja kelkaj, kiuj adaptiĝas al la mondo de l' ŝajno, la aliaj konsumiĝas, aŭ pro troa ĝuado de la vivo post suferegoj, aŭ pro troa strecado de la fortoj dum la milittempo. Nur la plej bonaj sen kompromiso iom post iom trovas la vojon returne.

La esprimmaniero de ĉi-dua verko estas iom mildigita kompare al tiu de la unua. Precipe mi ŝatas kelkajn priskribojn: La veturadon al la hejmurbo, la hamstro-ekskurson, la erarvagadon de Birkholz sur la erikejo Entute la aŭtoro ne tiom intencas skribi ian severan kritikon, sed iom moltonan rezignitan konstaton: lo mortis dummilite inter de ni Aliaj valoraj eldiroj estas (p. 41): eble nur pro tio ekestas milito ĉiam denove, ĉar neniam iu kapablas tute elsenti tion, kion suferas alia; kaj (p. 358): mi instruas al miaj knaboj, kiu vere estas ilia patrujo, ilia hejmlando kaj ne iu politika partio. La aserto (p. 252), ke plenkreskinto ne povas senti kun la junularo, laŭ mia opinio nur estas duona veraĵo.

La E.-traduko estas sambona kiel ĉiuj eldonaĵoj de Heroldo. Mi ne posedas la originalon, sed tamen volas noti kelkajn interesajn tradukojn: p. 9 okulpleno da dormo, p. 19 grate ĝeni en la kolo (im Hals kratzen), p. 32 klinkaŝiĝi, p. 39 malmemori (forgesi), p 45 nedorminta (unausgeschlafen), p. 83 n' tagon, p. 91 je la kaploko (an der Spitze), p. 95 kaj 99 la unu (tion solan), p. 181 maldiligenti (faulenzen), p. 293 pafoj vipas, p. 308 malteniĝi (sich lockern), p. 340 pave ruĝa (putterrot, korekte: maleagre ruĝa). Gravega eraro nur estas p. 168: Ĉar vi scias (wißt Ihr denn?), Ĉu vi do scias?

D-ro fil. Biehler.

Literatura Mondo-Budapest.

Mr. Tot aĉetas mil okulojn. Romano originale en Esperanto de Jean Forge, 1931, 240 paĝoj, bind. 4.75 gmk.

Ĉio homo portas maskon antaŭ sia vizaĝo . . , kaj ni serĉas unu la alion vane.“

Ĉu vi kara leganto, opinias tion vera? Ne? Tutegale, nia romano baziĝus sur tiu ĉi tezo. Mr. Tot, riĉega amerikano, suferas pri tiu ekkono kaj malesperas je la vivo pro troa satiĝo de ĝi. Ĉio estas trompo. Amo? — Senvestigi la korpon jes; sed la animon, ne!

Doktoro Kivikas — maskite: psika kuracisto, fenomena teknikisto; senmaske: eminenta krimulo, avida sadisto — prezentas sin al Mr. Tot kiel helpanto por malkovro de la homaj animoj per vendo de mil okuloj, tiamaniere, ke li instalas por li la plej grandan hotelon per tiaj teknikaĵoj, nomitaj televizoroj (=malproksimen-vidiloj), ke oni el de centra sekreta ejo povas kaj vidi sur ekrano kaj aŭdi per megafono ĉiujn okazaĵojn en ĉiu ĉambro kaj ejo de la hotelo aŭ sur la strato antaŭ la hotelo. Oni nur bezonas reguli multegon da kontaktiloj.

Nun komencas la granda ludo majstre pentrita de Forge. Ni vidas la al ni ne kutiman vivon de homoj ĉiam diboĉantaj, senhontan amindumadon de geviraĉoj, malĉastulinoj, dancistinoj; ni eniras hazardludĉambron, partoprenas vetkuradojn de detektivo kaj krimuloj . . .

Mr. Tot vane serĉas nudan animon, li ree estas trompita ĉefe jam de d-ro Kivikas kun lia krimula bando. Jam ni kredas lin morta laŭ decido de la trompintoj, jen li estas savita de sia detektivo, al kiu neniu aljuĝis detektivajn talenton kaj emon, kiu al ĉiuj ŝajnis ridinda, senkapabla homo: do ankaŭ li devis preni maskon por fari bonaĵon.

Ni travivis mondenan atmosferon ĝis la lasta fazo de ĝi, la krimo. La tuto estus tre

taŭga por filmo. La bildoj estas plastike pentritaj, alkatenigas nian rigardon, estas kvazaŭ averto kontraŭ turura erariĝo de homaj subkonsciaj deziroj. Forge jam aktivigis tiajn subkonsciajn fortojn en sia romano „Abismoj“.

Pri lingvo kaj stilo de Forge ni havas entuziasmon. Gratulenda estas Esperanto, ke ĝi kreskigas tiajn verkistojn.

Kelkaj el la uzataj neologismoj: argusa = akre-vida; ĉantaĝi = elpremi monon el iu senhonte, *fie; ŝalti = ekfunkciigi elektran* lampon, aparaton; ĝigolo = virinamuzisto; stopi = subite haltigi; volucio = ruliĝo, tordiĝo.

Lud. Siedl.

E.-Societo „Universo“-Wilno.

La internacia lingvo (Jiddisch) de d-ro A. Goldburt. 1931.

Malgranda, sed por la legantaro ege interesa kaj instruiga broŝuro. La aŭtoro priparolas unue jenajn faktojn, kiuj en la nuntempo igas la ekziston de unueca mondlingvo kulturnecesecon; por tio estas konsiderindaj unuavice la komunaj celadoj de la diversaj nacioj sur la kampoj de scienco, arto, sociala leĝdonado. Plue estas dirita, ke la penso pri tia mondlingvo ne ekaperis en la lasta tempo kiel inspiraĵo, sed jam estas tre malnova, tiel malnova kiel la homa kulturo mem. En granda koncizeco la verkinto pritraktas la plej gravajn evolufazojn de la internacia helplingvo, komencante de Cartesius kaj menciante Leibnitz, Carpophorophilus, Schleyer kun lia Volapük kaj fine venante al Zamenhof.

La malavantaĝoj de la antaŭaj malsimplaj provoj kaj projektoj kompare la simplan kaj facile ellerneblan Esperanton estas priparolataj kaj montrataj per ekzemploj. Vere kontentigas, ke la aŭtoro finas sian traktaĵon per akcentado de la ideala celo de Esperanto, alproksimigi la homojn ne nur fizike kaj ekonomie sed ankaŭ peri spirite-psikan harmonion inter la tuta homaro pro ĝenerala feliĉo kaj bono.

Prof. d-ro Papo.

„Catalogo de edizioni Esperanto“ (Katalogo de libroj en E.) n-ro 5, grandformata, 16 pĝ., nombras krom la de Paolet mem eldonitaj libroj grandaron de E.-literaturaĵoj diverslandaj. Mendu senpage.

Eld. de E.-Stenografio, Issy-les-Moulineaux.

Kelkaj **„Prozaj kaj poeziaj perloj“** el diversaj lingvoj tradukitaj de L. Cogen, skribitaj en Stenografio Duploye-Flageul, 16 pĝ, bela kovrilo, 1931, prezo 1 resp. kupono.

Hugai-iskola, Gyöngyös. Broŝeturo pri instaloj de eminente organizata privata lernejo en la hungara urbeto, kie nia fervora samideano, prof. Hugaj instruas regule Esperanton, dank' al kio nia movado ankaŭ en la publiko prosperas.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Schönaugasse 6/II, Vereinsheim (kunv.) Bürgergasse 4, Fr (v) 20-23 h.

Innsbruck.

Esperanto-Klub, Gasthof „Grüner Baum“, Museumstraße. Do (j) 20—22 h.

Leoben.

Esp.-Verein für Steiermark: Cafe Weidbacher, Mittwoch (me) 20—22 h.

Linz.

Oberösterr. Esp.-Verein: Gasthaus Stadtgut, Volksgartenstraße.

Steyr:

Oberösterr. E.-Verein: Gemeinschafterheim, Schlüsselhofstr., Fr. (v.), 20 h.

Wien.

Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Freyung 6 (Schottenpfarrkanzlei) Mi (me) 18—20 h.

Esp.-Unuiĝo-Wien, I., Schubertring (kafejo Kolowrat) Fr. (v.) 19.30 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17—19 h.

Vienna AkademiaUnuiĝo Esp. VIII., Langegasse 61 (Kafejo Lange), Mo (1) 19—23 h,

Esp.-societo „Fideleco“, Café Zoglmann. XVIII., Staudgasse 1, Di (m) 16-19 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstr. 154. — Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.